

Flandra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**, POSTBUS 100, MECHELEN
Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschiĝnt maandelĝjks
Een en twintigste jaarg.
Nummer 7 (239-240)
JULI-AUG. 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
Belgiĝ: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 f.k.)

Nia Beneluksa Esperanto-Kongreso en Lieĝo



(Kliŝo afable pruntedonita de „Le Monde du Travail”)

Sabaton posttagmeze

Estas en atmosfero, kiu memorigis la senegalan temperaturon dum la antaŭa Kongreso en Antverpeno, ke la plimulto de la kongresanoj vagonare vojaĝis al Lieĝo, en tiu pentekostsabata posttagmezo.

Iom antaŭ ilia alveno en la „Arda Civito”, la vetero tamen subite ŝanĝiĝis: fulmotondro kaj pluvego regis ĉe ilia alveno kaj la elementoj, dum momento, tiel furiozis, ke estis apenaŭ eble atingi la apudajn hotelojn kaj aŭtobusojn aŭ tramojn.

En la „Guillemins”-stacidomo, la alvenintoj estis bonvenigataj de membroj de la L.K.K. kaj, en la Turisma Oficejo, kiu estas en la ĉefstacio mem,

ili tuj ricevis koverton kun ĉiuj dokumentoj... multnombraj dokumentoj, tre interesaj...sed eble tro multnombraj por ke la kongresanoj ilin tuj serioze povu priantenti ekde l'komenciĝo aŭ eĉ dum la kongreso.

Reveninte hejme nur, la plimulto trovis i.a. la kolekton da belaj poŝtkartoj, donacitaj kun diversaj broŝuretoj...Sed, pro tiu eventuala nepriantento ne kulpas la L.K.K., kiu havigis al ĉiuj ĉion, kion ili povis deziri, laŭ orientiga vidpunkto.

La kunvenoj estis aranĝitaj en la bela salono de „Vénitien”, unu el la grandaj ejoj de Lieĝo kaj kie efektive, je la 16,30a h., malfermiĝis la jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto, kiun prezidis S-ro Maur. Jaumot-

te, administranto-prezidanto, kiu aprobis la bilancon kaj la kalkulon pri perdoj kaj profitoj kaj respondis al diversaj demandoj faritaj de aktiuloj.

Sur la ŝtuparo de la Urbodomo, la membroj de la urbestro, kiuj akceptis la kongresanojn, kun la gvidantoj de la diversaj Ligoj kaj kun parto de la kongresano.

En la mezo de la unua vico: la Skabeno Arets, kun edzino kaj kun S-ino Maréchal, konsilantino, kaj la aliaj oficialuloj. Maldekstren: S-ro De Brouwere, prezidanto de Flandra Ligo.

Sur la dua vico: meze, inter la skabeno kaj lia edzino: S-ro Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., kun maldekstren: D-ro Van Ginderdaelen, prezidanto de la Kongreso, kaj S-ro J. Soyeur, sekretario de la L.K.K.

Sur la tria vico, meze: S-ro Desonay, prezidanto de la L.K.K. kaj maldekstren: D-ro Kempeneers, prezidanto, kaj S-roj Maertens kaj Sielens, la sekretarioj de B.C.K.E.

(Oni povas mendi tiun ĉi fotografadon ĉe la ligo kaj grupaj sekretarioj, kontraŭ pago de Fr. 25,—)

te, administranto-prezidanto, kiu aprobis la bilancon kaj la kalkulon pri perdoj kaj profitoj kaj respondis al diversaj demandoj faritaj de aktiuloj.

Laborkunsidoj

Je la 17a, komenciĝis la laboroj de la Ligoj, kiuj kune organizis la Kongreson; krom de L.E.E.N., la nederlanda asocio, kiu ja akceptis kunorganizi tiun ĉi Beneluksan Kongreson, sed kiu tamen konsideris ke ĝi ne povis, - tiun ĉi jaron, - inciti siajn membrojn forvojaĝi eksterlanden, kiam la Universala Kongreso estas baldaŭ okazonta en propra lando, kaj kiu tial ne antaŭvidis specialajn kunvenojn.

Kelkaj nederlandaj amikoj, gvidataj

Universala Kongreso 1955

La estraro de UEA decidis, en sia paska kunsido ke la venonta Kongreso okazos en Bologna (Italujo).

Ni notu ke tiu kongreso unuflanke estas la 40-a U.K. kaj ke en 1955 estos pasintaj 50 jaroj post la I-a U.K., kiu okazis en Boulogne-Sur-Mer (Francujo).

de S-ro Weeke, vicprezidanto, tamen veturis Lieĝen kaj, en plej bona harmonio, kunlaboris kun la membroj de la du Ligoj en Belgujo.

S-ro De Brouwere prezidis kunvendon de la Ligestraro de Flandra Ligo, dum S-ro Jaumotte, la nova prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista, prezidis laborkunsidon, en kiu la plej grava temo pridiskutita estis tiu de la Internaciaj Foiroj kaj Esperanto.

S-ino Lecat raportis pri tiu temo kaj ŝi alportis tre detalajn klarigojn pri enketo, kiun ŝi faris ĉe la esperantistoj de diversaj landoj, kiuj persone interrilatis aŭ ankoraŭ interrilatas kun la estraroj de la diversaj Foiroj. Ni aparte konigos kelkajn el la informojn kunigitajn en tiu tre interesa raporto.

La Solena Malferma Kunsido de la Kongreso.

Post la vespermanĝo, kiun ĉiu laŭvole havis en „Vénitien” aŭ en apuda restoracio, ĉiuj rekunvenis, je la 20a horo, por la Solena Malferma Kunsido, kiun prezidis D-ro Th. Van Gindertaelen, kiu, laŭ interkonsento en B.C.K.E., estis indikata por tiu ĉi funkcio.

Sur la podiumo, la prezidanto estis ĉirkaŭata de D-ro P. Kempeneers, estrarano kaj speciala delegito de U.E.A.; de S-ro Weeke, vicprezidanto de L.E.E.N.; de la ligaj prezidantoj S-roj G. De Brouwere kaj M. Jaumotte, kaj de S-roj Desonay kaj Soyeur, respektive prezidanto kaj sekretario de la L.K.K.

S-roj Desonay, nome de la lokaj organizintoj, kaj Van Gindertaelen, nome de la Kongresestraro, bonvenigis ĉiujn en Lieĝo kaj deziris al ili plej komfortan restadon kaj fruktodonan laboron.

D-ro Kempeneers, unue, nome de U.E.A. kaj la aliaj prezidantoj, nome de la tri Ligoj, aldonis sian salutvorton al la jam esprimitaj bonvenigoj.

S-ro Weeke anoncis ke la proksima Beneluksa Kongreso okazos en Utrecht. Tiu ĉi anonco estis aplaŭdata akceptata.

S-roj De Brouwere kaj Jaumotte akcentis la bonan harmonion, kiu ekzistas en la lasta tempo inter ĉiuj espe-

rantistoj en la lando kaj substrekis la diversajn paŝojn, kiuj estis farataj en la lasta jaro por pli kompleta harmoniigo de la komuna propagandala laboro kaj kiuj evidentigis al ĉiuj per la starigo de la Belga Centra Komitato Esperantista. Kaj ambaŭ certigis, ke la estraroj de la du Ligoj havas la nepran volon daŭrigi ankoraŭ, ĉiam pli, tiujn klopodojn.

Kaj la vespero estis daŭrigata, ne plu per paroladoj, sed per la ĉeesto de bonege sukcesinta

Kabareda Vespero

al kiu partoprenis parto de la teatra sekcio de la Antverpeno Grupo „La Verda Stelo”, nome S-ro K. Amerijckx, bonega kantisto; F-inoj J. kaj M. Amerijckx, skeĉludantinoj kaj dancistinoj plej plaĉaj; S-ro J. Vinck kaj Ch. Van Gompel, kiuj, la unua, partoprenis al diversaj numeroj kaj la alia interligis tiujn numerojn per la rakontado de amuzaj ŝercoj. Tre trafe akompanis la kantojn kaj dancon, ĉe la pianoforto, F-ino Clara Peeters, dum S-ro Van der Stempel, de la Brusela Grupo Esperantista, enkondukis aŭbaŭ partojn de tiu programo, per atente aŭskultata pianoludado.

Kaj, - kvankam neanonce sur la jam presita programo -, la Bruĝa Grupo „Paco kaj Justeco” kompletigis tiun belan programon per kvin skeĉoj, ki-

UEA, kandidato por la Pacpremio de Nobel

La norvega parlamentano Carl Henry sendis al la Nobel-komitato proponon pri UEA kiel kandidato por la Pacpremio de Nobel por 1954. Al la propono estas aldona ampleksa dokumenta materialo pri la paciga laboro de UEA. La Nobel-komitato konfirmis al s-ro Henry la bonordan ricevon de la propono.

Antaŭ kelka tempo la Nobel-komitato decidis ne plu publikigi la listojn de kandidatoj, sed permesis al la proponintoj, mem publikigi informojn pri siaj proponoj. S-ro Henry rajtigis min, en ĉi tiu maniero konigi al la esperantistaro lian proponon.

(Bonvolu ne sendi dankletojn aŭ ion ajn al s-ro Henry aŭ al la Nobel-komitato).

C. STĖP-BOWITZ.

ujn sprite prezentis S-ro Roose, kiu mem ludis gravajn rolojn, kun sia edzino S-ino Roose-De Keersgieter kaj kun S-roj Maertens kaj Iserentant, dum F-ino Van Parijs, de la frata Bruĝa Grupo, bonvole anstataŭis forrestintan samideaninon.

Resume, la prezentado estis unu el la plej bonaj, prezentitaj dum nacia kongreso en Belgujo. Kaj ĉiuj artistoj estis longe kaj varme aplaŭdataj.

LA DIMANĈA TAGO

La Dimanĉa tago komenciĝis, por la katolikaj kongresanoj, per Di-servo en la Preĝejo de la Sta. Sakramento kaj dum kiu Abato Muller, el St. Vith, faris predikon en plej pura Esperanto. Li estis atente aŭskultata, ne nur de la kongresanoj, sed ankaŭ de la ordinariaj vizitantoj.

Je la deka, estis antaŭvidataj kunsidoj: jara, por Flandra Ligo Esperantista, kaj solena, por Reĝa Belga Ligo Esperantista.

La Jarkunveno de FLLE.

La Prezidanto malfermas akurate je la 10 h. la kunsidon, bonvensalutas la delegitojn de la sekcioj Antwerpen, Blankenberge, Brugge, Gent, Mechelen kaj Kortrijk, kaj la reprezentantojn el Lier, Heist-op-den-Berg kaj Roeselare.

Ĉar la saluttelegramoj jam estis laŭtlegataj ĉe la malfermo de la Beneluksa kongreso, la Prezidanto tuj donis la parolvicon al la sekretario, kiu prezentis la raporton, publikigitan en la maja numero de F.E.

S-ro DEBOES (Gent) petis klarigojn pri la kunlaborado inter la kvar asocioj, FLLE, L.E.E.N., R.B.L.E. kaj SES. La sekretario diris ke la baza kontrakto L.E.E.N. — FLLE restas senŝanĝa kaj ke la komuna eldono kun la aliaj du organizoj fakte nur validas por unu numero. Tial, tiuj asocioj

antaŭpagas la antaŭvidatajn kostojn al la kontraktintoj L.E.E.N. — FLLE en la manoj de la sekretario de FLLE. E. mem. La enordigo de la diversaj kontoj okazas nur post la ricevo de fakturo de la presisto. Tiu sistemo ne ĝenas la diversajn kunlaborantojn, se nur la baza kontrakto, kiu ankoraŭ validas ĝis la jarfino, restas. Kvankam FLLE tute ne volas fanfaroni pri tio, la sekretario tamen rememorigas la grandajn avantaĝojn por la kvar asocioj, sekvojn de tiu iniciato de FLLE.

S-ro DEBROUWERE, Prezidanto, tute konsentas kaj speciale dankas pro la farita laboro la ĉefredaktoron D-ro Van Gindertaelen kaj la sekretarion S-ro Maertens.

S-ro DECLERCQ (Gent) deziras klarigojn pri la funkciado de la B.C.K.E. (Belga centra komitato Esperantisto). La sekretario respondas ke tiu nova komitato glate funkcias. Ĝi jam dufojn kunvenis, ĉefe por preparoli la Beneluksan kongreson en Lieĝo kaj la paŝojn - rilate la petskribon - farotajn ĉe la UNESKO - delegitaro de Belgujo.

S-ro Vermuyten denove malfermas la debaton pri la ĵurnalo, precipe por averti nin kontraŭ troigo de la komunaj eldonoj. Se ekzemple ankoraŭ diversaj landoj aliĝus al nia baza kontrakto, ni ja baldaŭ disponus pri gaze-

to kiu estus preskaŭ tiel internacia kiel „Esperanto” de UEA. La sekretario kaj poste ankaŭ D-ro Van Gindertaelen klarigas ke komuna eldono estas limigita pro la malfacila tasko de la ĉefredaktoro. Aliflanke, la agadtereno de la naciaj gazetoj, ankaŭ se ili estas parte komunaj, tute ne kongruas kun la internacia tereno de UEA. Cetero ambaŭ gazetoj respegulas la movadon kies ligilo kaj komunikilo ili estas: la nacia organizoj ĉiam diferencas de la internacia. Aliflanke, la avantaĝoj por la kunlaborantaj asocioj estas ege grandaj; kaj ne nur el financa vidpunkto, sed precipe pro la forfalo de grandega tempoperdo; la samaj komunikoj pri internaciaj kongresoj, pri libroj, pri gravaj Esperanto-okazaĵoj k.t.p. ne plu estas kvarfoje kunmetitaj, kaj kompostitaj sed unufoje, kaj por la diversaj landoj en la plej bona formo. La sekretario aldonas ke de tempo al tempo aperas en nacia gazeto tre interesa ĉefartikolo. Ĉu tio ne estas bedaŭrinda se nur tri aŭ kvar cent personoj povas legi ĝin kiam ĝi meritas publikon multe pli grandan? Niaj ĉefartikoloj havas leĝantaron de 2500 Esperantistoj!

Post tiuj konsideroj, F-ino Terry ciferjonglas: ŝi komunikas ke la enspezoj de 1953 superas la elspezojn per 7.020 F; tiu sumo estis uzita por forigi la deficiton de la antaŭaj jaroj.

La kunsido unanime dankis la kaskistinon pro la bona mastrumado.

La jarkunveno akceptas la ŝanĝojn de la Organiza Regularo proponitaj de la estraro kaj de sekcio Mechelen. La propono de sekcio Brugge forfalas pro ne-akcepto fare de la estraro, apogita de la ĉeestantoj.

Al S-ro Couwenberg, peranto de FL. L.E. por UEA, oni petis la komunikadon de la individuaj membroj de UEA kiuj ne re-aligis al la lokaj sekcioj kaj reprezentantoj, por eventuale persone instigi ilin al re-abono.

Fine la kunveno akceptas la rezolucion proponita de la estraro.

Gen. kunveno de F.E.I.

La Pentekosta kunveno de Flandra Esperanto Instituto estis grava pro kelkaj decidoj kiuj rekte rilatas niajn gemembrojn. Detala raporto estos publikigata en la septembra numero de F.E.I., sed ni jam povas diri al vi ke F.E.I. konsentas doni rabaton de 10 % al ĉiuj membroj de FL.L.E., ĉe la aĉeto de libroj, escepte de la lernolibroj. Antaŭe tiu rabato ĝenerale estis konsentita nur por mendoj pere de la sekcioj.

Oficiala akcepto en la Urbdomo

Urĝe, ĉiuj rapidis al la Urbdomo, kie la Urbestraro estis akceptanta la kongresanaron je la 12a horo.

La Antaŭkongreso en Antverpeno

organizata de Belga Ligo Esperantista kaj de Flandra Ligo Esperantista okaze de la 39a Universala Esperanto-Kongreso en Haarlem (Nederlando).

DATO: La antaŭkongreso okazos merkredon, ĵaŭdon kaj vendredon, la 28an, 29an kaj 30an de julio, kun forvojaĝo el la Skeldo-urbo la 31an matene al Haarlem kie, kelkajn horojn poste, malfermiĝos la U.K.

ORGANIZO: Ĝi estas organizata en kunlaboro inter Flandra Ligo Esperantista kaj Rega Belga Ligo Esperantista, kiuj ambaŭ indikis la samajn estraranojn, kiuj pasintjare organizis la brile sukcesintan Beneluksan Esperanto-Kongreson en Antverpeno:

S-ro Maurice JAUMOTTE, prezidanto

D-ro Theo VAN GINDERTAELEN, vicprezidanto

S-ro Henri SIELENS, sekretario

S-ro Achille PITTOORS, kasisto

S-ro Fernand VOLDERS, festestro

S-ro Jules VERSTRAETEN, propaganda sekretario.

KOTIZO: La kotizo por la antaŭkongreso estas bfr. 50. Tiu kotizo estas pagota al Poŝtĉekkonto No. 4089.41 de aŭ postmandate al S-ro A. PITTOORS, Ten Eeckovelei, 125 DEURNE-Antverpeno.

LA PROGRAMO: La provizora programo kunmetita de la L.K.K. aspektas jene:

Merkredon la 28an de julio:

Antaŭtagmeze: Malfermo de la akceptejoj. Unua kontakto kun la urbo.

Posttagmeze: Malferma kunsido kaj bonvenigo de ĉiuj partoprenantoj;

Vizito al la Plantin-Muzeo.

Vespere: Interkonatiga Vespere - Balo.

Ĵaŭdon, la 29an de julio:

Antaŭtagmeze: Kultura horo. Oficiala akcepto en la Urbdomo.

Posttagmeze: Sipveturado sur la Skeldo; vizito de la haveninstalaĵoj.

Vespere: Granda Vesperfesto kun teatraĵeto, kantoj kaj skeĉoj.

Vendredon, la 30an de julio:

Antaŭtagmeze: Vizito al la Rubens-domo.

Tagmeze: Oficiala inaŭguro de la „Dro. Zamenhofstrato. Festmanĝo.

Posttagmeze: Vizito al unu el la grandaj industrioj en la antverpena regiono, kiel estas: petrolinstalaĵoj, aŭtomobilfabrikoj kaj/aŭ aliaj.

Vespere: Intima adiaŭa kunveno, en gaja atmosfero.

Sabaton, la 31an de julio:

Antaŭtagmeze: KOMUNA FORIRO AL HAARLEM!

La L.K.K. insistas por ke, nun, senprokraste, oni ĝiru sian aligkotizon aŭ sendu internacian postmandaton; kaj por ke karavan- aŭ grupestroj tuj prenu kontakton kun L.K.K.

Ili tiucele skribu ĉu al la sekretario: Henri SIELENS, Maaldersstr. 37 Antverpeno, ĉu al la prezidanto: Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44 Wilrijk-Antverpeno.

Estis la Skabeno Arets, kiu anstataŭis la urbestron. Li estis ĉirkaŭata de sia edzino; de S-ro Dejardin, deputito; de la gekonsilantoj S-ino Louise Maréchal kaj S-roj Grevesse kaj Lemaire, kaj de la urba sekretario S-ro Veillesse.

Post prezentiga vorto de S-ro Desonay, prezidanto de la L.K.K., la Skabeno eldiris tre belan paroladon, en kiu li memorigis la decidon, antaŭ multaj jaroj jam, de la Ligo de Nacioj, kiu estis vere favora al nia Lingvo, kaj aludis la preparoladojn en UNESKO, kiuj estos daŭrigataj tiun ĉi aŭtunon en Montevideo.

Li esprimis la esperon, ke plena sukceso povos esti atingata, tiel ke la homoj pli facile kaj pli bone interkompreniĝu.

Flue kaj plej laŭtekste, S-ro Jaumotte tradukis tiun ĉi paroladon en Esperanto, dum ĉiuj ĉirkaŭstarantoj, urbestraranoj kaj ĵurnalistoj, atente aŭskultis kaj...iom miris pro la fakto, ke nia lingvo povas esti tiel facile uzata.

D-ro Van Gindertaelen, prezidanto de la Kongreso, kaj D-ro Kempeneers, prezidanto de B.C.K.E., siavice, dankis varme la urbestraron de Lieĝo kaj tutspeciala Skabeno Arets kaj la akceptantan delegacion.

Kaj, ĉe l' trinkado de glaso da ĉampanvino, la estraranoj havis tiam belan okazon por, - dum kvaronhoro -, propagandi nian lingvon, buŝe kaj individue, apud la diversaj eminentuloj.

Fotografado sur la ŝtuparo de la Urbdomo estis la konkludo de tiu ĉi

memorinda akcepto.

Festa tagmanĝo en „Vaxelaire”

Kvaronhoron poste, ĉiuj kunsidis ĉe belarangitaj tabloj en rezervita salono de la grandaj magazenoj „Vaxelaire”.

Kvankam honora tablo estis aranĝita, la gemanĝontoj iom dise sidiĝis kaj sekvis tiam festeneto en plej agrabla, intima atmosfero, dum kiu ne estis paroladoj, sed dum kiu ĉiuj gustumis bonajn manĝojn, menciitajn cetero sur beleta manĝokarto:

Diversaj antaŭmanĝaĵoj

Kortbinda Kremo

Soleaĵo Dugléré

Pik-rostita bova lumbaĵo

Elĝardenaj legomoj

Terpomaj fritajetoj

Deserto

Kafo

La posttagmezo kaj vespero

Posttagmeze, kelkaj vizitis la urbon, sed multaj akompanis S-ron Soyeur al Cointe, kie ili vizitis la bazilikon kaj la internacian monumentoj al militmortintoj.

Vespere, oni renkontiĝis en la special-atmosfera kaj privata dancejo de la Klubo „Beaulieu”, kie kelkaj dancis kaj aliaj, intime babilante, kunsidis.

Ne estis vere esperanto- aŭ kongresa Balo, sed nur kunesto, en difinita ejo, kie ĉiuj povis renkontiĝi.

La L.K.K. ĉion aranĝis por ke tiu vespero ne iĝu tro multekosta por la kongresanoj kaj donis tiel solvon al, alimaniere, ne solvebla demando pri Kongresa Balo.

Lunde al Huy

Kaj, ĉar neniu estis vespere tro laca, ĉiuj plej akurate retroviĝis lunde matene, ĉe la enŝipigejo, por la boatekskurso sur la Mozo, al Huy.

La vetero ne estis tiel bela, kiel kiel pasintan ĵaron, por la ŝipveturado sur la Skeldo...Kontraŭe, dum la veturado, la aero estis iom freŝa kaj multaj rifuĝis en la keletaĝo de la ŝipo.

Ĉio tamen glate okazis kaj, je la indikita horo aŭ eĉ iom antaŭe, ni alvenis en Huy, kie la kongresanaro estis bonvenigata de la prezidanto de la „Syndicat d'Initiative”, kiu kondukis la grupon al la salono de la „Société Royale d'Harmonie”, kie atendis nin simpla manĝo, pri kiu la L.K.K. mem iom plendis ĉe la Societ-estro, sed kiu, pro la bona apetito kiun ĉiuj alportis post la Mozveturado, tamen estis rapide formangita.

Pro la foresto de la Kongresprezidanto, S-ro M. Jaumotte transprenis la agrablan taskon varme danki la membrojn de la L.K.K., kiuj senlace laboris

Lieĝo **Fidinda Raporto** pri pentekosta kongreso ne pente kosta

Valona Koko

*La „Kok' Valona” arde
En Esperanto kantis.
Ĉu estis nur hazarde
ke... l'suno ne konstantis?
Ni ĵuis en Lieĝo
pri ĉiu veterero
(escepte de la neĝo)
sed ĉio kun modero.
Modero estas virto
sed ĝi ne troe daŭru:
ke do l'valona birdo
plukantu kaj ne... fraŭlu.*

Lo-Koko

*Desonay, nobla patro,
kun barba emocio
ĝin metis en teatro:
Soyeur, impresario,
kantigis ĝin fervore
dum Guyot rideteme
asistis ĝin sufloro
kaj fine al kok' seme (1)
honorarion portis
Plyson, la abelino:
ŝi el... Monuj' eksportis
kun diligent-obstino.*

Ambaŭ Kokoj

*Inspiris ambaŭ kokoj
bonegan artistaron
el tri diversaj lokoj,
kaj prezidantan kvaron
je laŭdo reciproka
kaj kokolaŭdo same,
Per grava voĉo voku
instruis ili flame:
„Robolo”, „Folo”, „Leen-o”,
„jen tiaj antaŭnomoj,
„sed Esperanto beno
„nin ame faras „homoj”!*

1. pro la rimo; 2. preĝejo; 3. provizi per oleo aŭ benzino; 4. aŭtoro de „La arto fariĝi centjara”

Medito

*Mi tiam prem-tramadis
pensante pri ĉi amo,
enbrake min persvadis
en dua plena tramo.
Mi tion plumeditis
en „Sankta Sakramento”, (2)
el Ama Fundamento:
ĉar pastro Muller citis
la „fajraj langoj” ventis
al nia kapa fronto
kaj ni kapablon sentis
... paroli al la mondo!*

Manĝado-dancado

*„Sen trinko ne akcepto”
valon-gastam' klarigis
kaj pro tiu koncepto
la urbestrar' „kualigis”
Saŭmvin'. Fotografado
Elprovo pri l'fortiko
stomaka... post manĝado
Vizit' al baziliko
kaj post promeno pia,
vespere distro bala:
modern-dekoracia
medio... kanibala*

Sipado-kantado

*Al Huy veturis ŝipe
ni tra pejzaĝa belo,
ventkaresate... vipe
kun flirta „Verda Stelo”
Salon' deknaujarcenta
varmigis kaj ni kantis
sub gvido de l'talenta
Jaumotte, poste frandis
pri bela Huy kaj miris
ĉar multajn eklipsulojn
kafejoj nur altiris
Sed fermu ni l'okulojn*

Epilogo

*En Beneluks-kongreso
eĉ Nederland' ne mankis
Soifa (sen eksceso)
Van Gindertaelen... tankis (3)
Eĉ Wegener (la doktoro)
forĝestis pri dieto: (4)
ja regis bonhumoro
sen ĝena etiketo.
Cagrenis forveturoj
en plenaplen' vagona
sur unu aŭ du kruroj
kiel... la kok' valona!*

TYNEVERUM

okazon por, per varma kaj laŭta aplaŭdo, speciale adiaŭ-danki la nelacigeblan trion, kiu dum la tuta kongreso estis kaj restis kun la kongresanoj.

Kaj nun jam, la Kongreso ŝajnas iom for... Sed se la Lieĝa Kongreso jam mortis... tiu dum la Utrecht jam montriĝas en laŭŝajne ankoraŭ iom fora estonto, sed tamen jam en plena realeco, ĉar jam pli ol 50 el la Lieĝaj kongresanoj enskribiĝis por ĝi en impona Honora Kolono... kaj pagis sian kotizon!

Honoron al tiuj honorkolonanoj!

Adiaŭo!

Al Lieĝo, kie la disiĝo okazis, kiel ofte post Kongreso, iom abrupte... Tuta grupo tamen ankoraŭ trovis la

LA STUDANTO

Jen la ĝustaj formoj de

Ekzerco 17 A:

1: denove; novan. 2: Lia nuna; bona; bela, ŝanĝema. 3: surhavatan (ĉi tiu partecipa adjektivo apartenas al la substantivo „ĉapelon” kaj do havu la saman finajon); longe. 4: Surhavinte: scivola (li, estante scivola, rigardas . . .; ankaŭ: scivole; tiam la vorto indikas la manieron de rigardado); atente: allogajn. 5: Iutage preterpasante tian: subite; allogan, pli elegantan ol lia (ĉi tie estis preseraro en la ekzerco) propra (ne: propran, ĉar: ol lia propra estas!). 6: plenaj (relegu la klarigon ĉe 3: surhavatan). 7: okupita; helpema (objekta predikativo — bepaling van gesteldheid); nova. 8: Novan: tian, kia; ekspozata. 9: sian nunan mezure komparota (objekta predikativo); malplenan (direkta akuzativo). 10: servema: apude; grandan: vendotaj. 11: multajn; plurajn; helaj; aliajn: malhelaj; larĝaj; premaj. 12: Provinde; reprovinte kelkajn: fine ĝoje: agrable konvenantan (epiteto ĉe la substantivo „ĉapelon”); mia strangforma. 13: Ridetante: via propra.

Jen la ĝustaj konjunkcioj, subjunkcioj kaj prepozicioj de

Ekzerco 16 B:

1: kaj (ne: kun, ĉar „lia edzino” devas esti parto de la subjekto). 2: kun (ne: kaj, ĉar „sia” indikas posedon de la subjekto, sed mem ne povas esti subjekto). 3: Se: kaj (komparu 1). 4: Kiam; kun (komparu 2); kaj (eblas ankaŭ: kun). 5: ĉu; aŭ; aŭ. 6: ke; nek unu nek alian, ĉar. 7: ke; kaj.

La streketo en la fino de la sepa frazo estis komposteraro. Mi finis la frazon tiel: „tamen trinku ion”

Mi tre bedaŭras, ke la kompostisto tiel nenecese cerbumigis plurajn geekzercantojn, el kiuj kelkaj elektis la vorton „tiam”, kiu tie ne taŭgas, ĉar ĝi estas adverbo!

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 18 A:

Kie estas streketo, tien metu unu el la partecipaj finajoj: -ant-, -int-, -ont-, -at-, -it- aŭ -ot-: krome aldonu la gramatikan finajon:

Estim—Korespond—

1: La 39-a Universala Kongreso okaz— en Harlema estas alproksimiĝ—. 2: Harlema, urbo situ— en bela regiono, estas multe vizit— loko. 3: Mi estas tre

log— de ĝi. 4: Partopren— la kongreson, mi povos ekzerci la lern— internacian lingvon. 5: Hejme ĝi estas malofte parol—, sed ofte skrib—. 6: En la kongreso ĝi estos malofte skrib—, sed ofte parol—. 7: Ankaŭ mi tiam estos ne koresp—, sed parol— la lingvon. 8: Kiam ni estos trov— unu la alian, ni estos babil— de frue ĝis malfrue, nur en Esper—. 9: Mi estas nur komencino, do ne tiom ekzerc— la paroladon kiom vi, sed mi klopodos uzi ĉiujn lern—vortojn kaj frazojn, komprenig— minalvi. 10: Estu kore salut— de via sopir—, eks—cit—, antaŭĝoj—, kongres— koresp—ino.

VERDULINJO.

Ekzerco 17 B:

Kompletigu la verbojn per la ĝustaj finajoj:

1: Kara, mi jam skrib— al vi, ke mi partopren— la Universalan Kongreson. 2: Mi esper—, ke ankaŭ vi ĉeest—. 3: Est— grava momento, kiam ni vid— unu la alian. 4: Mia patro dezir—, ke mi prokrast— la libertempon. 5: Se mi far— tion, mi ne vid— vin. 6: Se mi partopren— la U.K., mi tre verŝajne vid— vin. 7: Sed mi demand— min, kiel mi trov— vin. 8: La foto, kiun vi send— antaŭ longe, eble ne plu don— vian nunan aspekton. 9: Est— rekomendinde, ke vi hav— rekonilon. 10: Kiam pluv—, vi leg— gazeton; kiam bril— la suno, vi ten— pluvombreton super via kapo kaj mi tuj rekon— vin. Kore salut— kaj ĉion bonan dezir—.

KONGRESEMULO.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn. Waltaweg 3, TJERKWERD (Frislando), Nederlando.

Muzika kaj mondlingva konkurso „Ariel”

Laŭ interkonsento kun la inicianto s-ro Gino Catarzi ni plilongigis la limtempon de la konkurso „ARIEL” ĝis la 20-a de aŭgusto, 1954. Tiu plilongigo tamen ne rilatas la branĉon. „Laŭro Verona”.

La juĝa komisiono de la konkurso konsistas el eminentuloj, konataj parte en la tutmonda kultura vivo, parte en la kultura vivo de nia movado. Jen iliaj nomoj: Profesoroj Umberto Maria Beretta kaj Andrea Mascagni (Ital.), komponisto F. Moolenaar (Nederlando), fino Birthe Traerup (Danlando) — por la muzika „Laŭro Kalocsay”, — licenciato Arthur Foote, Anglujo), red. Luis Hernandez (Hispanujo), profesoro M. Fernandez Menendez (Urugvajo), d-ro John Stenström (Svedlando), prof. Clelia Contrero Guglielminetti kaj poeto Mariano Rugo (Ital.) por la ceteraj branĉoj.

Eventualajn informojn donas la sekretario: D-ro F. Szilágyi, 3: dje Vilag. 26. Borás (Svedl.)

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

Elektu el jenaj havindaj libroj:

	gld.	fr.
Novaj Esperantaj Historietoj	1,70	
Du amosentaj noveloj (Storm. Escherich)	1,95	25,—
Bagatelaro (Rosbach)	4,—	55,—
Pli ol fantazio (Bösch Högsted)	1,30	22,50
Karlo (Privat)	0,75	9,—
La forto de l'vero (Adi)	1,10	20,—
Brulanta sekreto (Zweig)	2,35	30,—
La tempo-maŝino (Wells)	1,20	16,—
Judoj sen mono (Gold)	bind.	2,90
La Lanternisto (Sienkiewicz)	2,90	40,—
Ĉe la sanktaj akvo (de Heer)	6,60	75,—
Du Majstro-noveloj (Storm)	2,10	25,—
Saltego trans Jarmiloj (Forge)	1,85	40,—
„ „ „	broŝ.	1,10
La nekonata konato (Boatman)	1,25	28,—
„ „ „	bind.	1,85
Batalo de l'vivo (Dickens)	2,40	30,—
Peer Gynt (Ibsen)	8,—	90,—
Gösta Berling (Lagerlöf)	11,—	80,—
Anstataŭa Edzino (Maxwell)	3,—	40,—
Retoriko (Lapenna)	broŝ.	5,50
Aktualaj problemoj	5,—	65,—

Pri lingvo kaj movado:

Tra la labirinto (Faulhaber)	bind.	5,90	85,—
Voorzetsels in Ned. en Esperanto	„	2,50	26,—
Esperanto 60-jara (Degenkamp)	„	1,75	
„ „ „	broŝ.	1,30	18,—
Historio de la lingvo Esp. I en II	„	4,25	67,—
Tragiek en triomf van Zamenhof (Privat)	„	3,—	48,—

MENDU ĈE:

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.
Flandra Esp. Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst: S. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermeeuwstr. 29 Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

KOMUNIKOJ DE L.K.K.

Hartelijk dank voor de reeds ontvangen en nog toegezegde vlaggen! Verschillende help(st)ers hebben zich opgegeven voor de diensten „kas” en „uitreiking congresdocumenten”, maar aangezien ze niet voldeden aan ons verzoek, even te berichten hoe vroeg we Zaterdag 31 Juli op hen kunnen rekenen, hebben we, daar we niet langer konden wachten met het opmaken van een dienstrooster, de diensttijd van enkele andere medewerkers noodgedwongen iets moeten verlengen en de bovengenoemde personen bij andere diensten in moeten schakelen.

De excursieleiders ontvangen nader bericht van de leider van de afdeling: excursies en ook zal nog nader bericht gezonden worden aan allen op vier medewerking reeds Zaterdag 31 Juli en Zondag 1 Aug. een beroep zal worden gedaan. Voor het werk op de overige dagen raadplege men het dienstrooster bij de centraalpost in het congresgebouw, waar alle medewerkers zo spoedig mogelijk na aankomst worden verwacht.

We starten Zaterdagmorgen 31 Juli om 8 uur!

EXAMEN-UITSLAGEN

Amsterdam, 27-5-1954:

Aangemeld voor examen S 3 kandidaten, opgekomen 3, geslaagd 1; de heer J. Simons te Vlaardingen.

Aangemeld voor examen M 7 kandidaten, opgekomen 7, geslaagd 4; de dames G. Lalk-Beekman te Amsterdam en H. v. Groeneveld-Kwakernaat te Rotterdam en de heren F. Spronk te Hei- en Boeicop en D. A. F. v. Deijk te Zaandam.

Aangemeld voor examen E 61 kandidaten, opgekomen 59, geslaagd 33, de dames A. Hetterschij-v. Duyn, G. Ligter, M. Schippers-Ploegsma en J. F. Vluggen-Gregery te Amsterdam, R. L. Linschoten te Bilthoven, G. Hoefakker-Volk en M. A. Y. Wijn-Beemsterboer te Bussum, A. Houter-Velther te Oosterbeek, W. A. v. d. Berg te Poeldijk, N. J. v. Iperen-de Vries en M. de Kort te Utrecht, C. J. A. M. Drost en B. H. Graafhuis te Zeist en de heren

G. J. Louter, A. M. Peeraar en L. J. T. de Vreede te Alkmaar, H. J. Brouwer, K. L. de Bruin, K. Ruig, en W. Th. J. Zeiss te Amsterdam, G. Hornstra te Borculo, R. Boesaart te Castricum, P. C. v. d. Brugge, G. Droog en J. Schaap te Delft, J. Toet te Deventer, J. Buisman en E. J. M. Peeters te 's Gravenhage, W. Minnen te Oosterbeek, J. Kuipers te Sappemeer, J. P. Dekker te Tuitjenhorn, J. H. Jaspers te Waerland en E. J. Baadenhuysen te Zeist.
Aan alle geslaagden en in het bijzonder aan onze leden onze hartelijke gelukwensen!

De commissie is bij de beoordeling van het examenwerk deze keer wel bijzonder clement geweest, maar dat neemt niet weg, dat het percentage niet-geslaagden voor E groter is dan gewoonlijk. Verschillende kandidaten bleken geen notie te hebben van de exameneisen en hebben het er, na het doorwerken van een elementair leerboekje maar eens op gewaagd. De resultaten waren er dan ook naar! Er waren zelfs kandidaten, die het doorwerken van een eenvoudig leerboekje blijkbaar overbodig hebben geacht en kans zagen in de schr. vertaling Nederlands-Esperanto meer dan 50 grove fouten te maken. De schr. vertaling Esperanto-Nederlands getuigde maar al te vaak van een te geringe woordkennis en (of) gebrek aan vaardigheid om een eenvoudig stukje proza in gangbaar Nederlands over te zetten.

De commissie wijst toekomstige kandidaten en hun opleiders er nogmaals met nadruk op, dat de „Esperanta Krestomatia” geheel moet zijn gelezen en dat het noodzakelijk is (dit geldt in het bijzonder voor de schr. vertaling Nederlands-Esperanto) oude examenopgaven door te werken, alvorens zich voor het examen op te geven.

Anonceto

S-ino NELSON-WHITE, 3, Galloway street, HAMILTON, New-Zealand, ŝatus korespondi kun komencanto pri literaturo, muziko kaj fremdaj landoj.

Raporto Jarkunveno L.E.E.N.

(Fino)

Krome la sekcio bedaŭris la lastmomentan nuligon de la prelego de s-ro M. Stuttard. S-ro P. M. Mabeoone sciigas, ke pluraj sekcioj kaj personoj, ankaŭ eksterlandaj, proponis programon por la U.K., sed L.K.K. devis konsideri la dezirojn de U.E.A., kiu preferas teatraĵojn, ludotan de profesiaj aktoroj kaj tiu programero jam kostos g. 5000,—. Eble la kantato povos esti aŭdigata okaze de la venontjara jubilea kongreso. S-ro A. J. Kalma diras, ke pluraj sekcioj bedaŭris la nuligon de la prelegserio, same li mem, ĉar li komprenis la malfacilaĵojn de la sekcioj. Tamen tiutempe la aliĝoj tiel amase venis, ke s-ro Stuttard ĉiuvespere devis labori ĝis nokta horo. La prezidanto: „Konante la tiaman streĉan laboron de la K.K.S. ni ne povis ne rezigni.” S-ro H. Arends: „Ĉu la kantlibro de L.E.E.N. ankoraŭ aperos kaj ĉu parto de la baza kapitalo povos esti uzata por la jubilea kongreso?” La prezidanto respondas, ke la kantarkomisiono tiel malrapide laboris, ke la libreto ne povis pretiĝi antaŭ la U.K. kaj tio ja estis necesa, por havi merkaton por ĝi. Nur antaŭ proks. du monatoj la ĉefestraro ricevis informojn pri la kostoj, enhavo kaj kompostmaniero, kiuj ne estis laŭdeziraj. Tial la ĉefestraro devis decidi rezigni pri la eldono. Evidente la prezidanto de la komisiono ne informis pri tio siajn kunlaborintojn. S-ro P. M. Mabeoone diras, ke ni devos atendi ĝis post le U.K. antaŭ ol ni povos decidi pri la destino de eventuala resto de la baza kapitalo, kiun ni povos uzi por la jubilea kongreso nur post kunsento de la donacintoj. S-ro J. Rooker (Amsterdam) plendas pri la multaj eraroj en la numeroj de N.E., kiuj aperis en la komenco de la nuna jaro. S-ro A. Willemssen (Arnhem) faras demandon pri la kvara sekcio en R'dam, kiu tamen neniel koncerne kunvenon aŭ L.E.E.N. S-ro S. Pragano komunikas, ke la Esp.-vojaĝo de N.R.V. efektive okazos. S-ro J. Telling (R'dam) petas informojn pri la nuna stato de la nova vortaro kaj demandas, ĉu L.E.E.N. povos reeldoni la nederlandan slosilon kaj ĉu L.K.K. por la U.K. bezonos ankaŭ standardojn. „Ĉu la propaganda servo disponas pri sufiĉe da mono por propagandi E-on en ia stacidomoj kaj ĉu ne estas dezirinde menciigi E-on en la telefonlibroj?” S-ro A. J. Kalma: „La unua parto de la vortaro (Esp.-Ned.) estis prespreta, sed la eldonisto ne plu kuraĝis riski la eldonon kaj alia eldonisto ne troviĝis ĝis nun.” S-ro P. M. Mabeoone diras, ke La Int. Esperanto-Instituto havas la eldonrajton de la slosilo, sed verŝajne ĝi ne reeldonos ĝin pro la multekostaj kliŝoj, necesaj por tia malgranda libreto, kiu nur de tempo al tempo estas aĉetata. Reklamo en la stacidomoj superus nian buĝeton. S-ro C.

B. Zondervan plendis pri ricevo de komunikoj de la gazetarservo, ne uzeblaj, ĉar ili temas pri specifa R'dama afero kaj petas kontakti kun direktoroj de seminarioj por se eble jam nun okazigi E-kursojn en la seminarioj. Ni streĉu niajn fortojn, por atingi sukceson sur tiu tereno. S-ro P. M. Mabesoone diras ankoraŭ kelkajn vortojn pri s-ro Goldsmith, la agema sekr. de U.E.A., kiu fine de la nuna jaro emeritiĝos. Li atentigas pri la propono, presita sur la dorsa flanko de la tagordo. S-ro J. Th. de Goey proponas, ke la L.E.E.N.-anaro donu la bezonatan monon por ebligi la eldonon de la nova vortaro. Se ĉiu donos g. 10,— ni certe povos kolekti g. 10.000. S-ro S. Pragano subtenas lian proponon. Certe estas multaj, kiuj volos doni g. 50,— por tiu celo. S-ro A. J. Kalma estas malpli optimista. Estas diferenco inter teorio kaj praktiko; por la baza kapitalo ni esperis ricevi g. 7500,— sed tiun sumon ni tute ne atingis. Se oni sukcesos kolekti sufiĉan monsumon, nur post multaj jaroj la donacintaj ricevos la monon kaj se la prezo de la vortaro pro malgranda eldonkvanto estos tre alta, kiom da ekzempleroj vendiĝos? Cetere la kompilintoj jam perdis la entuziasmon. La prezidanto: „La ĉefestraro esploros kaj atentos la opinionon tiel de la optimistoj kiel de la pesimistoj.”

La prezidanto dankas pro la harmonia kunlaboro en ĉi tiu jarkunveno. La kunvenintaro kantas ankoraŭ „La Espero” kaj post „ĝis revido!” disiĝas en ĉiuj direktoj.

A. J. Kalma, ĝen. sekr.

Kompilita laŭ raportoj de f-ino A. v. d. Beek kaj s-ino S. Mabesoone-Visser, al kiuj ni kore dankas pro la farita laboro.

ESPERANTAJ ELDONEJOJ!

La Universitata biblioteko, en Zagreb — la urbo de la 38-a U.K. de Esperanto — posedas pli ol duonan milionon de diversaj libroj inter kiuj konsiderindan nombron de Esperantaj libroj kaj gazetoj (grandparte eldonitaj en Jugoslavio).

Pro tio ĝi registris la verkojn pri kaj en Internacio Lingvo kiel apartan fakon en siaj katalogoj. Por fari tiun fakon pli impona estas petataj ĉiuj eksterlandaj eldonistoj kaj libroservoj sendi po 1 ekzempleron de disponeblaj originaj kaj tradukaj verkoj en Esperanto. Kiel nacia biblioteko por Kroatio la biblioteko montras apartan intereson por la libroj verkitaĵoj de enlandaj aŭtoroj.

Adreso: Sveučilišna biblioteka, Zagreb, Jugoslavio.

La redakcio atentigas ke la nuna numero estas tiu por junio kaj julio 1954, kiam la venonta gazeto aperos 1.9.54!

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)

Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

Aliloke en la gazeto vi estos legitaj detalan raporton pri la kongreso kaj pri la kunsidoj de nia Ligo, el kio montriĝis kontentiga kaj jesja sukcesa aktiveco sur la Liga kampo, kvankam sur la sekcia la vigleco ĝenerale ne estas tre granda.

Malgraŭ la libertempo ni tute ne endormiĝis! Efektive okazos kunsido de B.C.K.E. (Belga Centra Komitato Esperantista) en Antwerpen la 10-an de julio 1954 (ĝi estos pasinta, kiam aperos ĉi tiu numero de F.E.) kun jena tagordo:

- 1 Malfermo;
- 2 Protokolo pri la antaŭa kunveno;
- 3 La Universala Kongreso en Haarlem;
- 4 Nij Beneluksaj Kongresoj;
- 5 Nij jubileoĵ 1955;
- 6 Nia Estonta Agado;
- 7 Diversaĵoj;

Krome okazos kunsido de la ĉefestraranoj Fl.L.E. en Blankenberge, dimanĉon la 18-an de julio proksima; ni esploros diversajn problemojn kaj i.a. nian 25-jaran ekziston, festotan en

1955, ĉar nia Ligo estis efektive fondita en 1930.

La estraro jam komencis la preparojn por inde festi tiun datrevenon. Se vi havas efektivegeblan ideon en la kadro de tiu jubileo kaj en akordo kun niaj celoj, bonvolu komuniki ĝin al la sekretario.

La estraro danke akceptos viajn sugestojn kaj funde esploros ĉiujn rimedojn por, eventuale en kunlaboro kun la aliaj Asocioj, plej trafe rememorigi la laboron de la „pioniroj” de Fl.L.E.

Ni ankaŭ instigas niajn anojn partopreni la Antaŭ-kongreson, organizitan de Flandra Ligo kaj de Belga Ligo, en Antwerpen, de la 28-a ĝis la 30 de julio venonta; poste estos eble „karavane” veturi al Haarlem, la 31-an, por ĉeesti la komencajn kunsidojn de la Universala Kongreso mem.

Naskiĝo

Al ges-roj E. Cortvriendt - De Pril, Diepestr. 44, Antwerpen, naskiĝis la 14-an de junio 1954, fileto *Stephan*. Nijajn korajn gratulojn!

VERDLANDO VOKAS

Informoj kaj Petoj:

Radio Roma disponigas siajn mikrofonojn al la tutmonda Esperantistaro! — Esperantistoj posedantaj magnetofonan aparaton estas invitataj kunlabori en la rubriko „PAROLATAJ LETEROJ”. B.v. sendi plastikan bobenon kun enparolita paroladeto, registrita sur magnetofona paper-strio (Sound Recorder Tape) 1/4 x 1200 ft. rapideco 7 1/2 inc. = 19 milimetroj/sekundo, al Radio Roma, casella postale n-ro 320, ROMA (Italujo). La bobeno estos resendata je poŝtelspezoj de la stacio. La enhavo estu en perfekta Esperanto kaj la registrado bonkvalita, la temoj plej variaj, sed nur internacie interesaj kaj ne politikaj, ĉe daŭro de la prezentado 18-minuta. La kunlaboro estas senhonoraria. Komisiono senapelacie decidos, ĉu la „parolota letero” indas esti radiodissendata.

Petu radiostaciojn disaŭdigi Esperanto-diskojn. — Ekzemple la Esperantomarŝon, Esp. tangon kaj la D-ro Zamenhofmarŝon de Jac. Feitsma, la Lulkanton de Brahms, „Se vi konsentas, amatin’” kaj „La Espero”-n kantatajn de Marguerite Sautreuil.

Informojn pri Esperantoradiodissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al:

S. S. de JONG Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD (Frislando), Nederlando.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 169/170: S-ro A. Van de Velde, Gentbrugge, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: f-ino A. Elzinga, el Leeuwarden.

SOLVOJ.

169. rudimenta, scienculo, akordiono konkubino, inflamigi, privatulo, vidalvide, ilustraĵo, mistifiki, elektrizi, vidindaĵo, riskemulo, frekventi, sanatorio, refreŝigi, oranĝerio, strangoli, preskribi, kunteksto, trembrili, obstinulo, klientaro, vidpunkto, brulvundi. Dion fidu, sed senfare ne sidu.

170. nekomparebl, venen, ardez, tip, grumo, aprob, manprem, ŝarg, unison, vinjet, sond, — navigi, varii, konsum, malgajn, menton, prunte, akapar, periost, ekdorm, kojno, lezebl.

171. influ, ursin, fos, ebria, teror, re, ornat, ni, kom, end, admir, tif, mut, tut, polur, ignor, — cifere, utopi, bek, ofer, fals, ioma, nufar, detru, justa, intim, eter, ostr, mani, ond, knari, stern.

172. Komenca inklino daŭras ĝis la fino. Ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos. Nin instruas eraro kiun faras najbaro. Mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas. Ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan.

173. ANSTATAŬIGU.

en ĉiu el la subaj vortoj unu literon kaj intermiksi por formi novan vorton respondantan al la donitaj klarigoj. La aldonitaj literoj, legataj de supre malsupren, formas Zamenhofan proverbon.

1. oni ĝin portas sur la kapo. 2. li helpas en teatro. 3. malfermi grandan buŝon. 4. rampulo. 5. legomo. 6. arbo. 7. korpoparto. 8. mallongige. 9. akre kritikanta verko. 10. konkuranto. 11. moderigi. 12. molusko. 13. hinda marĉarbaro. 14. helpanto en komercfirmo. 15. problemo. 16. ornama rubando. 17. planto similanta al pizo. 18. Dipatrino. 19. rondo. 20. luma insekto. 21. stimulo. 22. metala disketo kun surskriboj. 23. parto de vestaĵo. 24. cerealo. 25. vortoparto. 26. bona spirito. 27. japana vesto.

La ŝanĝotaj vortoj: 1. kerubo. 2. sulfuro. 3. dikeco. 4. cerealo. 5. koltuko. 6. radikoj. 7. rutino. 8. somero. 9. kiraso. 10. valoro. 11. strebi. 12. makulo. 13. lavango. 14. muziko. 15. tandemo. 16. lavango. 17. tirano. 18. dinamo. 19. lekcio. 20. primolo. 21. perono. 22. lameno. 23. kameno. 24. kaleŝo. 25. telero. 26. panelo. 27. maniko.

174. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. personigo de materiala riĉeco(R); nutraĵo de besta denove. 2. moviĝi(R). 3. neplenkreskaj amfibiaj bestetoj; atingi, ekz. per ŝtono(R). 4. prefikso. 5. moka dirmaniero(R), pripplantita terspaco(R). 6. gimnastikilo(R); kvalito; persona pronomo. 7. de mi ne scias kia kvalito; konstante; malgranda.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12

1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

8. diafana mineralo kun metaleca brilo (R); homo per kies helpo oni traktas aferojn kun aliaj personoj. 9. deviga regulo(R); senparola(R). 10. fariĝi(R); ideala modelo(R); piedvesto. 11. pene legimbalbonan skribajon(R); trafikilo(R). 12. korpoparto(R); grupo(R); persono.

Vertikale. 1. turmentegi(R); posteulo (R). 2. efektive ekzistanta(R); embarasanta(R). 3. amerika vegetaĵo el kies radikoj oni ekstrakas grion(R); instrumento(R); demanda vorto. 4. kontinento (R). 5. sen ŝuoj(R). 6. metalo(R); bulbo(R); prepozicio. 7. longa veturo; havi inklino. 8. vulkano kelkfoje faras tion. (R). 9. havanta ordonpovon(R); prilabori linon(R). 10. membro(R); tuko kiun virinoj portas(R). 11. reĝa krono(R); skatolo por tefolioj. 12. senpatra infano (R); rabobirdo; frakcio(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 *hs.*, Amsterdam-Z., la membro de Fl. L.E. aŭ de R.B.L.E. al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberg, antaŭ la 25/VII/1954.

Bibliografio

POŝTKARTOJ kun portreto de beata Papo Pio X, eld. Unio de Italaj Katolikaj Esp-istoj; ĝi surhavas aprobitan preĝon en E. Havebla ĉe la eldonejo, Via Rovereto 6, Verona (It.). Prezo: I resp. kup. por ekzempleroj.

DU POŝTKARTOJ, unu pri ĉeflokomotivestro F. Gahler, la alia pri la Esperantoweg en Glinde; mendeblaj ĉe Bruno Gahler: Esperantoweg (24 a), Glinde/Hamburg (Germ.) Prezo: 5 ekz. por 1. resp.kup.

El „Als mens Geboren”

Leginte tiun libron „Naskiĝinta kiel Homo” de Fr. De Schrijver (Eld. P. Vink, Antwerpen-Amsterdam 1952) min precipe frapis la enkonduko (Woord Vooraf) kaj kelkaj frazoj en kiuj aperis la vorto *Esperanto*, kvankam ĉi tiu povus trovi pli altstaran komparon! Mi tradukis ilin sube. (*Redakcio*).

Enkonduko

Ekis la milito per la fratomoŝto je Abel.

La historio de la jarcentoj instruis ke la milito kaj ties sekvoj estas konsiderendaj kiel necesa malbono. Io kontraŭ kio la fato-signita homaro senpovas.

Ĉiam, kiom jam aĝas la mondo, vivantaj, pensantaj estajoj frontis unu la aliajn per armiloj.

Kaj la tempo kiu devis instrui nin, nenion ŝanĝis.

Signifu por vi „Naskiĝinta kiel homo” la frapeton sur la pordo. Ĉar enfunde ĝi estas kulpigo de ĉiu senpripensa perforto. Kaj samtempe avertito.

Ĉar nun, moderna homo, vi sekvas la vojon de memneniigo.

Aŭ ĉu la krio de la naskanta patrino estas ja malbono?

Mi kapablas nur kapjesi kaj rideti. Kvazaŭ interkonsentinte ni ambaŭ ridas, kore kaj funde. Mi trovas ŝin bela, tre bela. El mia pantalonpoŝto mi sukcesas eligi kelkajn ĉifitajn bankbiletojn kaj jetas ilin sur la tablon. Amo kaj mono, mi pensas, estas la *Esperanto* de la mondo. Ankaŭ la milito, eble... (p. 90-91.)

IDILIO

*Ŝi, la denaska belulino,
Li, ver-barbaro ĝis la fino.*

*Ŝi, ungoaro ruĝlakita,
Li, la fasado brunbakita.*

*Frenezaj ambaŭ kaj ebriaj
Pro reciprokaj ĉarmoj siaj.*

*Li petas: ĉu?
Ŝi flustras: Jes!*

*Pli ol feliĉaj ili estas
En ĝarden' Aranĵuez.*

A. D.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).